Dimancha koncerto
(Vasárnapi koncert)

Sub la girland-ornamitaj traboj
en la domo Edward Wolanin ludis
Nocturne-on de Fryderik.
La No 1 in B flat Minor Op. 9-on.
Dimancha koncerto estis
en naskighdomo de Chopin.
Silento kaj enprofundigho pia.
Apud mi Aarne Puu
estona-pola-rusa poeto,
en siaj genoj iomete fenno-ugra
same kiel mi.
Li notadis.
Ni auskultis la muzikon.
Estis sunbrila autuna posttagmezo,
en la ghardeno
inter faletantaj arbfolioj
reve promenantaj virinoj kaj viroj.
Pli fore, kovrate de branchoj
de acerarbo,
iu fotis
edzighfestan paron.

Nocturne No 1.
George Sand demandas:
Chu vi amas min ankorau ?
Jes ! Kaj tiam kaj eterne.

Parisa, Varsovio, Zelazowa Wola.

La falantaj folioj
surkovras
malaperantan piedsignon
de Chopin……..

Tradukita de János Ruff